



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 5-a de Septembro 2016

**Ĉeestantoj:** Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Eldad Salzman, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi.

*Protokolo de la antaŭa kunsido (4-a de Julio 2016) – Rimarko de Ŝlomo: ni devas aldoni al tiu ĉi protokolo la detalajn regulojn de la elspezoj. Ŝlomo verkis ilin hebree, Amri tradukas en E-on. - Akceptita unuanime.*

### **1. Raportoj**

a) Amri pri la UK:

- Gabi salutis la kongreson, kaj faris propagandon pri la memorlibro de Josi.
- Dum la Movada Foiro ELI sukcese prezentis dum du horoj siajn novaĵojn.
- La memorlibro bone forvendiĝis, ĉ. 8 ekzempleroj loke tra la Libroservo, la ceterajn 8 prenis Ionel al Rotterdamo. Ilia prezo estas 18 eŭroj, ELI ricevas 12. Ankaŭ la KD-oj bone vendiĝis, po 15 eŭroj, ELI ricevas 12.
- Eran preskaŭ estis elektita kiel komitatano C.
- Dum la kunsido de KAEM Amri raportis pri la agado de ELI.

b) Jehoŝua raportas pri mencio de E-o en filmo, kaj en libro – pri Raĥel la poetino, kaj pri ŝia esperantista koramiko.

c) La TV-programo de Ŝoŝja sukcesis bele, ĝi estas trovebla en la reto, sed ĉiuokaze Dror enmetos retligon al ĝi en nian retejon, ke ĝi estu facile videbla.

### **2. Israela Kongreso 2017**

a) La loko: Aŝkelon? Eilat? Modiin? Aliaj ideoj? - La intencoj fokusiĝas al Aŝkelono, pro kelkaj vidpunktoj (ŝanĝado inter nordo kaj sudo, vidindaĵoj, ktp). Jehoŝua kontaktos Nava pri la komencaj pasoj. La datoj povas esti: 30/3-1/4, 6-8/4, 20-22/4. Jehoŝua serĉos malmultekostan gastejon en la reto, prezojn, kaj akireblecon dum tiu periodo.

b) Eksterandaj gastoj: usona bahaa familio (dum aprilo), kaj du ĉehinoj (ĝis la fino de marto). Ni provu preni tion en konsidero por la dat-elekto.

### **3. Financoj** (Ŝlomo)

a) Financa raporto pri la elspezoj en 2015 – disdonita presite surloke.

c) Vojaĝelspezoj por estrarkunsidoj: Estis proponoj de Doron, sed neniuj estis akceptitaj. La Estraro decidis ne ŝanĝi la decidon, akceptita en marto, kaj validas ĝis nun. Aliaj repagoj povas esti: telefon-elspezoj al Matilda, dum la organizado de du jaraj eventoj, vojaĝelspezoj de Eldad kaj Miĥal rilate la klubajn kunvenojn, ktp.

b) Procedo decidi pri elspezoj: Ŝlomo verkis kaj proponis ĝin, ni fiksis skribi kaj oficiale.



c) La postulo de la Administranto pri Societoj pri la aĉeto de oficejo – La Estraro nomumas Ŝlomo okupiĝi pri la serĉado kaj aĉeto de taŭga ficejo, konsilante kun la estraro. *Voĉdono: akceptita kun unu sindeteno.* Krome: Ŝlomo aldonos peton al la Administranto, ke unu estrarano (Jehoŝua) petas rendezuon por diskuti tiun temon (en Jerusalemo).

#### **4. Memorlibro pri Josi** (Amri)

a) Ĝi estis finita per prema laboro antaŭ la UK. 32 ekzempleroj estis presitaj, pli ol 400 paĝoj, 200 fotoj, 52 artikoloj. La komenca prezoferto preskaŭ duobliĝis, ĉar la nombro de paĝoj duobliĝis, kaj multaj paĝoj estis koloraj – fine unu libro kostis al ni 70 siklojn. 16 ekz. iris al la UK, vendoprezco 18 eŭroj, ELI ricevas 12. Amri dankas la kunlaboron al ĉiuj kunlaborantoj, ili (kaj la familianoj de Josi) ricevis la restantajn ekzemplerojn dum la somerfina renkontiĝo.

b) Amri aĉetis lastmomente la ISBN-numeron (180 sikloj).

c) La presado de la dua eldono, post pliaj korektoj, estos malpli kosta, ĉar evidentiĝis ke ni povas redukti la nombron de koloraj paĝoj, kie tio ne estas bezonata. Amri sukcesis tiel marĉandi ĝis 50 NIS por unu ekz. anstataŭ 70. Eldonkvanto de la dua eldono: 60 por ELI-membroj kaj entute 100 ekzempleroj. *Voĉdono: unuanime akceptita.*

#### **5. KD "Nova tago venis" de Ŝoŝja/Amir**

a) Kiel jam menciite, estis vendado dum la UK, vendoprezco 15 eŭroj, ELI ricevas 10.

b) Laŭ nia antaŭa decido la enspezo dividiĝas inter ELI kaj Ŝoŝja po duono. Sed Ŝoŝja cedas pri sia parto. Ni klopodu tamen konvinki ŝin akcepti duonon de la enspezoj kiel interkonsentite.

#### **6. Dratverejo** (Jehoŝua)

La policistino havis troigajn postulojn – ni ne akceptis ŝin. Sed estas nova luanto por 2800 NIS ekde novembro, la parencoj de la nuna luantino, la vidvino. Ŝi tamen sukcesis truki kaj resti ĝis novembro por la malalta lupago, 2000 NIS. Ŝajnas, ke nun ŝi forlasos fine la loĝejon, ŝia filo jam dankis al ni ke ni lasis ŝin por pliaj monatoj. La nova kontrakto (post etaj ŝanĝoj) estos subskribita venontsemajne, de 1-a de septembro 2016 ĝis 30-a de junio 2018, poste de la 1-a de julio por ĉiuj du jaroj. Ili donos ĉekojn nun por 20 monatoj antaŭen, (pagos kontante septembron). Ŝlomo; ni ne devas redoni la garanti-ĉekojn dum la venontaj du monatoj, por ke ne venu nepagitaj sumoj (urba imposto, akvo, kurento, telefono, ktp). Gabi: La anonco restos ankoraŭ unu monaton. Post la subskribo mi nuligos ĝin (Jehoŝua sciigos).



## **7. La Eta Princo**

Propono de Oded: Estas brokanta librovendejo en Tel Avivo, kie estas eksponita tiu libro en pluraj lingvoj. Oded proponis starigi tie ankaŭ la E-linvan tradukon. En la kelo de Doron troviĝas unu ekzemplero (de ELI). La libro elĉerpiĝis sed lastatempe estis reeldonita. Ni povus mendi (de la eldonisto en Kanado aŭ de UEA) 3 ekzemplerojn, kaj vendi en tiu vendejo, ankaŭ dum la Libro Foiro. ni ankaŭ povus profiti iom, ankaŭ propagandi la lingvon. (*sen diskuto*)

**La venonta kunsido:** lunde, la 10-an de Oktobro 2016, je 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi